

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Januaro—Febr. 1954

42-a jaro N-ro 1-2

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

EL LA ENHAVO

Radio-eĉo	2
Prezidant-intervjuoj	3
De la Federacio	5
Nederlando—Kongreslando	6
Vojaĝo al Haarlem	7
Novelo — poemoj	8
Recenzoj — Konkurso ARIEL	9
Tra la gazetaro	10
Nia lingvo	11
De la Instituto	12
Jubileoj	13
Kurso	14
Montevideo	15
39-a UK-bulteno	16

Abono { por Svedujo Kr. 6:—
 { por eksterl. Kr. 7:—

Specimena n-ro Kr. 0:75

Poŝtĝiro: SEF 2012



*La monumento pri samgentaneco ĉe
Rottneros.*

*Vermlando
vokas
al la*

48-a kongreso de SEF dum 1954 en Karlstad.

Vermlando vi belega, vi plej bela land,
vi krono de landoj en Svedlando!
Se eĉ mi venus mezen de l'promesita land,
mi tamen reirus al Vermlando.
Mi tie volas vivi, kaj tie mortos mi.
Se iam el Vermlando knabinon prenos mi
mi scias, ke mi neniam pentos."

Al tiu provinco de la belaj vidaĵoj kaj diligenta laboro, iam prikantitaj de nia granda provinca filo Erik Gustaf Geijer kaj poste priskribitaj en la mondkonataj verkoj de Selma Lagerlöf ni nun vokas la Svedan Esperanto-Kongreson en 1954.

Certe ĉiuj esperantistoj kaj ankaŭ modestaj komencantoj kaj simpatiantoj volas ĝui la kamaradan kunestadon en sveda kongreso por poste pli bone povi partopreni la imponajn internaciajn kongresojn! La jarkongreso de SEF do komenciĝos en "Grand Hotell", Karlstad, pentekostan sabaton la 5an de junio, posttagmeze, kun la ĉefaj kunsidoj dum la pentekosta tago.

Tiun ĉi fojon ni volas akcenti la turistan kaj literaturan-kulturatan flankon de via kongresvojaĝo, ĉar matene la duan pentekostan tagon la kongresanoj per grandaj aŭtobusoj faros malmultekostan ekskurson laŭlonge de la rivero Klarälven al Ransäter, la naskiĝdomo kaj nuntempa gentbieno de Erik Gustaf Geijer. (Ankaŭ Tage Erlander naskiĝis najbare.) Poste ni vizitos Märbacka, la hejman-muzeon de Selma Lagerlöf, "Lövdala" en "Gösta Berling", kaj eble kun iom da respekto rigardos ŝiajn belajn aĵojn. Traveturinte Sunne, "Bro" en G.B., ni atingos la nuntempe fakte plej vizitindan lokon de Vermlando, la grandbienon kaj belan parkon de Rottneros, "Ekeby" en Gösta Berling.

Loka Jarkongresa Komitato volas doni al vi bonan konsilon: Decidu jam nun aliĝi al la Jarkongreso en la "Sunurbo" kaj havigu al vi la interesan literaturon pri Vermlando! — Koran bonvenon!

Gustav R. Johansson

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Jan. - Febr.

1954

Kelkaj vortoj de la redakcio

Pro translokiĝo de nia presejo (demuntado, transporto kaj surmuntado de la presmaŝinoj) amasiĝintaj festotagoj (Kristnasko, Novjaro, Epifanio) laŭleĝe senlaboraj, bedaŭrinde prokrastiĝis la presigo de nia januara numero. Por iel kompensi niajn rajte senpaciencajn legantojn, la redakcia komitato (Sune Ahlm, Harry Törnskog & T. M.) decidis aperigi duoblan numeron. Per "Enhava tabelo" ni intencas atingi pli facilan tragardon de nia gazeto.

Unuavice interesas nin la sorto de nia movado en nia propra Svedlando kaj Skandinavio, samtempe ni deziras legi iom ankaŭ pri la marŝado de nia afero en la tuta mondo vasta — por ni unu "rondo familia". Jen kial ni intervjuis la Prezidantojn de niaj oficialaj organizaĵoj: SEF, CDEL, NEL & UEA.

En la nova agadjaro plej proksime al nia koro estas la federacia jarkunveno en la eterna sunurbo, Karlstad, ĉefurbo de pitoreska Vermlando prikantita de Selma Lagerlöf, Fröding, Geijer (legu nian gvidartikolon!).

Du gravaj eventoj internaciaj koncentrigas nian atenton tutmondan al **Haarlem** (Kongreso de UEA) kaj Montevideo (UNESKO-konferenco). Lastloke ni antaŭvidas montojn da malfacilaĵoj. Sed tiaj ekzistas por ke ni venku ilin per kunigitaj fortoj. Ĉiu monero bonvena por akceligi niajn klopodojn pri sendo de esp. reprezentanto, arango de ekspozicio, presigo de informaj broŝuroj ktp. Ĉiu klubo, ĉiu ano faru sian devon! (Eĉ se ni ne plene sukcesus ĉe tiu plej alta kultura forumo de la ŝtatoj, tamen almenaŭ nia konscienco restos trankvila, ke ni faris nian devon!)
Timo.



Preĝejo en Delft (Nederl.).

Radioeko

I decembro förekom i ett radioreportage från en Europakonferens i Rom mellan ett litet antal intellektuella ett uttalande av prof. Einar Löfstedt om esperanto. Tyvärr har Radio tjänst åtminstone hittills icke kunnat meddela mig den exakta ordalydelsen. Prof. Löfstedt yttrade emellertid bl. a., att han skulle finna det löjligt att läsa t. ex. Churchill eller Herman Hesse på esperanto.

Det internationella språkets uppgift är ju dock icke att avstänga skönandar och filologer från möjligheten att läsa engelska, franska, ryska eller kinesiska författare i original. Dess uppgift är att ge sådana personer, som icke har tid att ägna stor del av sitt liv åt studiet av flera språk (affärsmän, naturvetenskapare, "vanliga" människor), möjlighet till kontakter med alla folk, utan åtskillnad, på det språk, som alla lär sig i alla länder. Om syftet är mera praktiskt och ideellt än litterärt, så är denna eventuella (ej dokumenterade) brist, resulterande i en förmodad oförmåga att återge t. ex. Churchills språk, ingenting att finna komiskt. — Vi kan f. ö. finna njutning i att läsa Shakespeare på engelska, men vi kan också beundra esperanto under en skicklig poets behandling, i t. ex. Kaloscays egna poem eller hans framstående översättning av Divina Commedia, eller i Rosbachs tolkning av Peer Gynt, enligt en engelsk kritiker bättre än förefintliga översättningar till engelska.

Om man enbart vill bedöma språkfrågans lösning ur kräset litterär synpunkt (varvid man likväl har glömt att litterära mästerverk presteras inte bara på de stora språken utan också på de små) och därjämte utan tillräcklig kännedom om esperantos möjligheter, blir nog resultatet, som vid denna konferens, en "melankolisk resignation" och ett fortsatt språkkaos.

Bengt Joelsson

Aftonbladet 13. 12. 53 "Nobel, vår andes stämma i världen" ...

... "Det skulle då inte skada att de herrar som framträder på estraden kunde tala kulturspråk. Naturvetarna ska vi inte tala om. Men Svenska Akademin. Ja, den har nu av gammalt inga engelskspråkiga talare."

... "Att yrkesspråkmanen Einar Löfstedt inte skulle göra succé i Hyde Park Corner hörde man i Erik Hj. Linders onsdagskvällsprogram "Samtal om Europa."

Esperantista ferio 1954 en Lofthus, Norvegujo

Cu vi ŝatos pasigi ferian semajnon en belega regiono en Norvegujo dum la venonta somero? En Lofthus, Hardanger, estos denove internacia esperanta restado, ĝi okazos de la ii-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1954.

Jam plurajn jarojn la norvegaj gesamideanoj aranĝis feriosemajnon en Lofthus, kaj ĝi brile sukcesis.

La restado havos lokon en Hardanger Folkehøgskule, popola alternejo kiu situas ĉe la bela fama Hardangerfjordo — ĉirkaŭita de majestaj altmontoj.

Ĉitie vi povos ĝui la kunestaden kun gesamideanoj el multaj landoj (kutime 9—10) aŭskulti prelegojn, partopreni diskutojn, amuziĝi, kaj kunesti en interesaj ekskursoj al la montpintoj kaj sur la fjordon.

Pasigu vian ferion en Lofthus, vi ĝuos la lokon kaj admiros la belegan naturon!

La restado inkluzive ĉiuj ekskursoj kostos norvegajn kronojn 150: —.

Anoncu vin al, kaj petu informojn, ĉe, Okcidenta Distrikto de N. E. L., adr. Kristian Sivertsen, Blekenberg 52, Bergen, Norvegujo.



Ek al 1954!

La federacia estraro decidis dividi la landon je distriktoj por ebligi pli grandan aktivecon en la regiona laboro. La kluboj aŭtomate apartenas al tiu distrikto en kies regiono ili kuŝas. Distriktaj organizoj ankoraŭ ne estas fonditaj en ĉiuj regionoj, sed estas la espero de la federacia estraro ke iom post iom ni havos tiajn. La kluboj mem prenu la iniciaton kaj SEF volonte servas per informoj, proponoj al statutoj k.t.p. La regiona organizo:

Distrikto nro	La nomo de la distrikto	Amplekso
1	Skånes distrikt	Malmöhus och Kristianstads län.
2	Västsvenska distriktet	Hallands, Göteborgs och Bohus samt den del av Älvsborgs län, som är belägen söder om linjen Dalslands sydgräns.
3	Jönköpings läns distrikt	Jönköpings län.
4	Sydostsvenska distriktet	Blekinge, Kalmar och Kronobergs län.
5	Gotlands distrikt	Gotlands län.
6	Östergötlands distrikt	Östergötlands län.
7	Skaraborgs läns distrikt	Skaraborgs län.
8	Värmlands-Dals distrikt	Värmlands län samt Dalsland.
9	Örebro läns distrikt	Örebro län.
10	Stockholmsdistriktet	Södermanlands, Västmanlands samt de delar av Uppland och Stockholms län, som ligga söder om linjen Bro—Åkersberga.
11	Upplands distrikt	De delar av Uppsala samt Stockholms län, som ligga norr om linjen Bro—Åkersberga.

12	Dalarnas distrikt	Kopparbergs län.
13	Södra Norrlands distrikt	Gävleborgs län samt Härjedalen.
14	Mellannorrlands distrikt	Västernorrlands och Jämtlands län förutom Härjedalen.
15	Övre Norrlands distrikt	Norrbottnens och Västerbottnens län.

Ni esperas ke nia decido al portos bonon al nia federacio kaj ke la regiona organizo faciligos la laboron por la klubaj estraroj. Se ni havos bonajn regionajn organizojn estos pli facile por la federacio plani prelegojn por eksterlandaj prelegistoj, kaj en aliaj manieroj vigligi la vivon en la kluboj. La kluboj komencis raporti siajn membrarojn por 1954, sed estas kelkaj kiuj kun bedaŭro raportas ke oni ne sukcesis havigi same altan membraron kiel dum 1953. Samtempe oni resendas la superfluaĵajn membrokartojn, sed ni petas la klubojn konservi la kartojn, ĉar certe oni povos, dum la jaro, havigi novajn anojn. La celo estu: neniuj kluboj malkresku, ĉiu klubo devos havi novajn anojn. Pripensu se ĉiu klubo havos nur unu novan anon dum la jaro, la federacio kreskos ĉiujare kun preskaŭ 100 membroj.

Nia espero estas ke la estraroj de la kluboj povos dum januaro kaj februaro raporti pri sia stato.

Senperajn membrojn kiuj ankoraŭ ne pagis ni admonas, ke ili faru tion kiel eble plej baldaŭ, ĉar tio tre faciligas nian laboron. Tiu admono validas ankaŭ por la membroj de UEA.

La jaro 1954 estas grava jaro por la movado. Ĉiu esperantisto bone scias kio okazos en Montevideo. Kaj nur forta movado povas efektiviĝi la decidojn de Unesco, kiaj ajn ili fariĝos.

Ni deziras al ĉiu klubo kaj al ĉiu unuopa membro de la federacio: Bonan Novan Jaron! Kaj la membroj promesas al la federacio: Dum 1954 mi faros mian plej-eblon por ke la federacio kresku kaj iru al "glora estontecco".

Tg

Noto de la red.

Bv. sendi al ni maŝinskribitajn manuskriptojn retente kopion por vi mem, ĉar ni ne resendas la originalon. Afable klopedu esprimi vin koncize, konsiderante nian etan spacon.

Svenska Esperanto-Förbundet Sveda Esperanto-Federacio

Adreso: Tegelbacken, Stockholm C. Kotizoj por izolaj membroj 1954: 12 kr., junuloj 5 kr., familia membro sen gazeto 5 kr. resp. 2 kr.
Telefona: 20 00 43.
Poŝtgiro: 20 12.

La oficejo estas malfermita lunde kaj jaŭde 19 h—21 h.

Federacia estraro:

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö. Tel. 292 11.
Vicprezidanto: Bengt Joelsson, Husabyvägen 1, 3 tr., Hägersten. Tel. 19 78 05.
Sekretario: Harry Törnskog, Trumslagargatan 5 A, Älvsjö. Tel. 47 32 88.
Vicsekretario: Gulli Svensson, Skansgatan 1, Malmö. Tel. 150 70.
d:o Nils Henning, Långsjövägen 41, Älvsjö. Tel. 47 19 18.
Kasisto: Ruben Enocson, Sandhamnsplan 1, 5 tr., Stockholm Ö. Tel. 67 79 83.
Vickasisto: Sonja Morariu, Götaforsvägen 1, Enskede 7. Tel. 48 20 78.
Studgvidanto de SEF: Einar Hult, Boställsvägen 9, Arvika. Tel. 17 87. Al li sendu ĉiajn raportojn pri kursoj.
Esperantofrämjandet. Poŝtgiro 90 08 08. **Esperanta Turista Komisiono.** Poŝtgiro 503 60.
Eksprozia fako de SEF: Adreso: S-ro Per Tandlund, Norra Promenaden 118, Norrköping.

LA PREZIDANTOJ PAROLAS:

E. Malmgren

U.E.A.



La jaro 1953 ĝenerale estis favora al Esperanto. Aparte nin ĝojigas la intereso por Esperanto, montrita de la ŝtatoj kaj oficialaj institucioj kaŭze de la traktado de nia problemo en UNESKO. Kiel rezulton de la jaro ni ankaŭ kun fiero povas montri al la impona laboro farita de multaj landaj asocioj kaj de U.E.A. por disvastigi la scion pri la uzado kaj la uzebleco de Esperanto. Kaj mi sentas min kortuŝita kaj dankema pro la fido de la svedaj esperantistoj al U.E.A. montrita per la lastmonataj kolektoj por ebligi al U.E.A. sendi reprezentanton al la UNESKO-konferenco en Montevideo. Jam kolektiĝis 2.000 kr.! Mia esperantista koro dum la jaro ankaŭ ĝojfrapis pro la brila kongreso en Zagreb, pro la sukcesa kurso en Frostavallen k.t.p.

Ĉu ankaŭ malsukcesoj?

Sed la jaro 1953 havis ankaŭ makulojn. Ankoraŭ troviĝas inter la ĝenerala publiko neimagebla nescio pri Esperanto. Antaŭ kelka tempo, ekzemple, aperis en Stokholma ĵurnalo intervjuo kun iu sveda sciencisto, kiu i.a. diris: "Mi nur pene povas imagi al mi ion pli malspritan, eĉ komikan ol legi la verkojn de Winston Churchill en esperanto". — Mi sendis al la ĵurnalo artikoleon (kiun la redakcio rifuzis publikigi), kaj en ĝi mi i.a. akcentis: "Tute prave oni konsideras aroganta kaj nedeca malestiman parolon pri iu ajn nacia lingvo (kiun oni eble eĉ ne estras). Same arogante estas paroli malestime pri esperanto, kiu hodiaŭ ne plu estas lingva projekto sed vivanta lingvo, parolata de centmiloj da homoj en la tuta mondo. Se oni mokas lingvon, ĉu naciaĵon ĉu Esperanton, oni samtempe ofendas la personojn, kiuj uzas tiun lingvon."

Nova perspektivo?

Esperantistoj! En la jaro venonta ni kune streĉu nian forton por postuli de la publiko pli kaj pli grandan respekton antaŭ Esperanto. Kaj respekton ni havigos al la internacia lingvo per faktoplena argumentado en lingvaj diskutoj, per ampleksa kursaranĝado, kaj per diversspeca utiligo kaj uzado de la lingvo — ankaŭ dum la grupkunvenoj por kreskigi la nombron ne nur de Esperanto-parolantoj sed de Esperanto-oratoroj!

E. Malmgren
Prez. de U.E.A.

J. Strönne

S.E.F.



Rerigardo:

Plej unue mi deziras al ĉiuj Bonan Novan Jaron!

La pasinta jaro alportis multon, pri kio oni povas ĝoji, kaj mi kaptas la okazon danki al ĉiuj svedaj esperantistoj, kiuj ĉiu en sia loko faris sian devon por la antaŭenmarŝo.

Kaj en 1953 SEF siavice faris sian plejblon.

Ni tutsimple povas konstati ke la pasinta jaro estis tre bona. Ni memoru bonsukcesan jarkongreson en Halmstad. La aperinta libro Normandaj Rakontoj laŭ diversaj opinioj estas vere luksa reprezentanto por la E-literaturo. Nia gazeto ricevis novan redaktoron. Ni ne forgesu la interesan kongreson en Zagreb, kiun partoprenis multaj svedoj, SEF fariĝis Peranto de UEA kaj tiamaniere ebligis ke pli efika propagando por membreco de UEA povas okazi en nia lando. SEF pretigis sian parton de la materialo por UNESCO. La reklamo okazis diversmaniere, i.a. pere de afiŝoj senkostaj kaj pere de novpresita broŝureto. Kaj startis la prelegserio en Frostavallen, al kiuj ni sopiris dum multaj jaroj.

Antaurigardo:

Ni daŭrigu en 1954. Tiu jaro estos tre grava.

SEF kaj la svedaj esperantistoj faros sian kontribuon al la tutmonda monokolektado por Montevideo, la loko de UNESCO en 1954. Ni devas en la plej efika kaj frapa maniero montri nian lingvon al la aŭtoritatuloj de la mondo. Sveda Somera Semajno invitas al nova prelegserio en Frostavallen, kaj denove ni pruvos la kulturen valoron de esperanto. Karlstad faros sian plejblon por la jarkongreso, kaj kune ni iru al Haarlem por kongresi. Post Haarlem ekzistos bonaj eblecoj fari vizitojn en Eŭropo uzante esperanton.

La kursstatistiko de la nacia kursgvidanto donis al ni la plej ĝojigan sciigon en 1953, kaj ni forte esperas, ke ĝi eĉ pligrandigos la ĝojon en 1954, se ĉiuj esperantistoj faros sian devon, parte alportante novan adepton, parte mem partoprenante kurson.

Sed en 1954 sendube iom pli maturiĝos afero, kiu naskiĝis en 1953. La sento pri skandinava kunlaboro. La skandinavaj landoj nun sentas, ke estas eble kunlabori pli efike ol antaŭe. La pasportoj estas for, la ekonomiaj rilatoj pliboniĝas, la komunikiloj pliboniĝas. Sistemo pri skandinavaj kongresoj en la kadro de la nun ekzistantaj jarkongresoj baldaŭ estos fakto.

Ĉiu faru sian plejblon.

Jan Strönne
Prez. de SEF

O. C. Lange

C.D.E.L.



Støp-Bowitz

N.E.L.



Saluto

Oni donis al mi okazon skribi kelkajn vortojn en via ŝatata gazeto; la unuaj do estu kora saluto de CDEL, al la sveda samideanaro kun espero pri daŭra progreso de la Esp. movado vialanda, precipe pri prospero por nia frata organizaĵo SEF.

Bilanco

Ce la sojlo de nova jaro estas nature iomete mediti pri la estinteco kaj estonteco. Bilancon kiel en komerco oni ne povas fari, ĉar la valoroj de nia movado ne povas esti esprimataj per kronoj kaj oeroj, oni ne havas mezurilon, per kiu oni povas mezuri la valorojn en nia "butiko". Cetere ni certe havas multajn valorojn, kiujn ni tute ne konas; tio estas la neuzitaj fortoj de modestaj, malmulte konataj membroj, kies iniciato sin montros iutage, kiam ĝis estos urĝe bezona aŭ kiam ĝi estos matura.

Prelegoj, instrukciaj kursoj, karavanoj

Ni havas en Danujo la impreson, ke la sveda movado pli bone, pli precize kaj pli energie laboras ol estas eble al ni. Tamen ni provis solvi la grandajn, gravajn taskojn, kiuj dum la pasinta jaro venis al ni de la superaj instancoj, mi pensas precipe pri la raporto al Unesco, la agado antaŭ la Eŭropa Konsilantaro, gazeta servo, arango de prelegvojaĝoj k.t.p. Ni faris la unuan paŝon por apliki Ĉe-instruistan laboron, provizore per nur unu instruistino, sed verŝajne ni datrigos la sistemon. Niaj flankaj organizaĵoj laboris kiel kutime bonege, la feriaj kursoj de s-ro L. Friis okazis somere en Helsingør kaj aŭtune en Vejle, la ekzamena komisiono faris novajn planojn por ekzamenoj, kaj pluraj karavanoj al eksterlando organiziĝis, el tiuj unu sub CDEL mem al la UK en Zagreb.

Kluboj. Ekspozicio. Mondkongreso en Kopenhago?

La plej grava estas tamen la laboro de la kluboj, ĝi estas la fundamento de la tuta movado. Multaj el niaj kluboj laboras bone, ekz. la kopenhaga klubo antaŭ nelonge okupis standon en la kadroj de publika ekspozicio en la plej granda halo en Kopenhago, "Forum", kiun vizitis ĉ. 64.000 personoj kaj la sama klubo invitis al Universala Kongreso en Kopenhago.

Kunlaboro

Aliaj tre gravan problemon ni traktis dum kelka tempo, nome kunlaboron inter la 3 skandinavaj aŭ eĉ la 5 nordaj landoj sur specialaj kampoj. Estas ĝojige konstati, ke estas granda intereso por tia kunlaboro, kaj se nur unu el la ekzistantaj proponoj efektiviĝos, ĝi povas havi grandan signifon por la Esp. movado en niaj landoj.

Eble tiu kunlaboro krakterizos la novan jaron. Sed estas aliaj gravaj, urgaj taskoj. Ni ankoraŭ ne venkis en la batalo kontraŭ la nekompreneo ĉe Unesco kaj Eŭropa Konsilantaro. Ni streĉu en la venonta jaro niajn fortojn por konkeri tiujn redutojn.

O. C. Lange
Prez. de Centra Dana
Esperantista Ligo.

Kiel pasis 1953?

La jaro 1953 en la norvega movado portis la signon de postkongresa jaro, ĝi estis kvazaŭ elspiro post la febra preparado al la 37a Universala Kongreso en Oslo en 1952. Sed tio neniel signifas ke la movado en nia lando stagnis post la kongreso. La kursoj estis malpli multaj, efektive, sed la membraro tamen kreskis, kaj novaj kluboj fondiĝis, kaj entute la aktiveco estas kontentiga. Pli grava estas tamen la pli granda kompreno pri Esperanto, kiun ni rimarkis flanke de diversaj organizaĵoj kaj aliaj institucioj, parte eĉ oficialaj, kaj kio certe estas rezulto de la kongreso. Tre grava estis ankaŭ la fakto ke Norvega Esperantista Ligo en 1953 por la unua fojo okazigis sian jarkunvenon en la norda parto de la lando, en Narvik, kio grave kontribuis al la fortigo de nia movado en la malproksima nordo.

Kaj la taskoj estontaj? Komprenoble ni plivigliĝu la kursagadon. Sed antaŭ ĉio aperas gravaj signoj de deziro pri kunlaboro en diversaj kampoj, enlande kaj antaŭ ĉio sur skandinavia bazo. Mi tuŝu nur tri erojn de tia kunlaboremo. Unue la estraro de N.E.L. decidis klopodi por fondado de pli multaj distriktaĵoj, t. e. regionaj kunlaboraj organizaĵoj de la kluboj, do subdividoj en la kadro de N.E.L. Due, laŭ sveda propono, okazas nun intertraktadoj pri planoj kun la celo ke la dana, norvega kaj sveda landaj asocioj alterne proks. ĉiun 3an aŭ 4an jaron okazigu sian jarkunvenon en alia tempo ol la aliaj du asocioj por tiel ebligi al membroj viziti jen unu, jen alian el la najbarlandaj jarkunvenoj, ne bezonante foresti el la jarkunveno de la propra lando. Tiel ekz. la redaktoro de NORVEGA ESPERANTISTO, s-ro Johan H. Rosbach, vizitis en 1953 la danan jarkunvenon, kaj en 1954 li intencas viziti la svedan, laŭ invito de S.E.F. Ni esperu ke ĉi tiu plano estigu pli intiman kunlaboron inter la skandinavaj Esperantomovadoj. Trie, laŭ norvega iniciato, oni planas por la somero 1954 en Helsingør kurson por "Esperanto-gvidantoj", t.e. studkurso pri gvidado de kluboj, pri propagando kaj administrado de la movado. Samtempe ni klopodas starigi studkurson por gvidantoj de studrondoj en Lofthus. — Sed antaŭ ĉio ni ĉiel preparu nin por la batalo por Esperanto ĉe la UNESKO-konferenco en Montevideo en la fino de 1954.

Mi deziras al la sveda Esperanto-movado prosperan novjaron 1954.

C. Støp-Bowitz, prez. de N.E.L.

Nederlando — kongreslando

De la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭg. ĉi-jare okazos en Haarlem la 39-a Universala Kongreso de Esperanto. Certe multaj svedoj kiel alilandanoj kaptos la okazon viziti Nederlandon por partopreni la kongreson. Antaŭ ol ni veturas al fremda lando, estas bone scii ion pri ĝi kaj la vivo tie. Pro tio mi mencias kelkajn karakterizaĵojn.

Nederlando estas malgranda lando, iomete pli granda ol nia provinco Småland, sed la lando havas loĝantaron de pli ol 10 milionoj da homoj.

40 % de la lando kuŝas sub la marnivelo. Dum la batalo de la jarcentoj la Nederlandanoj konkeris vastajn regionojn de la maro. Ili estas sirmataj de la maro pere de dunoj, kiuj diversloke estas kvin kilometrojn larĝaj kaj sesdek metrojn altaj.

La regiono sub la marnivelo estas stranga teritorio. Ĝi estas konstruata de fekunda argilo, kiun la riveroj Rejno, Maas kaj Schelde ĵetis flanken de siaj bordoj. Tie estas riĉaj paŝtejoj por brutaroj kaj bonaj kampoj, kie kreskas greno, fruktoj, legomoj kaj bulboj.

Le sekigitaj regionoj estas nomataj polderoj. Ili estas ĉirkaŭataj de digoj kaj inter tiuj la kanaloj formas densajn retaĵojn. Konata vidaĵo estas la vent-mueliloj, kiuj antaŭe pumpis la font- kaj pluvakvon de la polderoj al la kanaloj. Nuntempe oni faras tion pere de vaporforto.

Nederlando batalis kaj ankoraŭ daŭre batalas kontraŭ la akvo, sed oni sekigis unu marĉon post la alia. Por sekigi grandan parton de la Suda Maro oni konstruis ferm-digon, kiu havas longecon de 40 kilometroj. Kvar mil personoj laboris ses jarojn antaŭ ol ĝi estis preta. Laŭlonge de la digo troviĝas duobla fervojo, larĝa aŭtoŝoseo kaj bicikla vojo. Post la terura katastrofo la nederlandanoj planas konstrui similan digon apud la Norda Maro, sed kun longo de 50 kilometroj.

Vi certe miras, ke dek milionoj da homoj povas vivi en tiel malgranda lando. Generale oni pensas, ke la nederlandanoj plej multe vivas el siaj florkulturejoj. En Nederlando estas proksimume ok mil florbulbkulturistoj. Ili produktas hiacintojn, narcisojn, gladiolojn, kaj aliajn bulbojn, sed la tulipoj respondas je sep dekonoj de la tuta bulbeksperto, kiu atingas 150 milionojn da kronoj ĉiujare.

La tulipkulturejoj ĉirkaŭ Harlemo estas la plej grandaj en Eŭropo kaj mondkonataj. La sablotero en la florkampoj havas malaltan kaj egalan temperaturon. La subtera akvonivelo estas ideala.

Keukenhof, en la apudeco de Haarlem, estas la plej belega loko por bulbvariadoj, uzoj kaj grupplantadoj. En aprilo—majo multege da homoj veturas tien por vidi la florekspoziciojn. Sed ne kredu, ke oni vidas florojn nur en la printempo.

Aalsmeer estas florcentro speciale por rozoj, krizantemoj kaj diantoj. Ĝi povas esti nomata florfabrika, ĉar ĉio kreskas en varmkulturejoj. Tie troviĝas ankaŭ floraŭkcio, kiu funkcias kiel la Stokholma borso por valorpapiroj.

Nederlando havas ankaŭ grandan ĝardenkulturadon. La plej konata regiono estas la tiel nomata "Westland"-distrikto. Tie troviĝas grandaj varmejoj por vinberoj, persikoj, tomatoj kaj legomoj.

40 % de la lando estas uzata kiel paŝtejo. Pro tio la bredado havas grandan signifon. Unu el ĝiaj plej gravaj produktoj estas fromaĝo, kiu estas ankaŭ eksportata.

Malgraŭ ke Nederlando estas tipa terkultura lando, nur 20 % vivas el terkulturo kaj bredado dum 40 %

el industrio kaj 25 % el komerco kaj navigado. Inter la grandaj industrioj ni povas menci la cigar-, ŝu-, teks- kaj ĉokoladindustriojn. Unu el la plej konataj industriurboj estas Eindhoven, kiu ricevis mondfamon pro sia granda industrio de "Philips".


Vizitante Nederlandan familion, oni unue sonorigas ekstere ĉe la trotuaro kaj la pordo malfermiĝas per ŝnuro, kiun la gastiganto tiras de supre. Vi ne bezonas grimpi montojn en la malalta lando, sed nun vi devas grimpi mallarĝan, krutan ŝtuparon. Je la unua vizito en tia domo mi tuj demandis min kiel estas eble transloĝi en tiun domon. La mebloj estas portataj tra la fenestroj, ĉar laŭ la ŝtuparoj tio ne eblas. Tiuj domoj havas pintajn frontonojn, sur kiujn oni povas pendigi puliojn kun ŝnuro, kaj tial la fenestroj estas tiom grandaj.

Ciu domo, kiu plej ofte estas destinata por du aŭ tri familioj, havas propran eniron de la strato. Tipa nederlanda loĝejo ĝenerale havas sidĉambron kun grandaj fenestroj al la strato, kuirejon kaj unu aŭ du ĉambrojn. Unu ŝtuparon pli alte troviĝas dormĉambroj. Por tia loĝejo la lupago estas proksimume 50 fl. monate. Kontraŭe tia loĝejo ne estas tiel moderna kiel sveda loĝejo. Oni ne havas centran hejtadon kaj varman akvon. Eĉ en novkonstruitaj domoj ne estas kutime havi centran hejtadon.

La nederlandanoj multe ŝatas agrablan familian vivon. Kiam nederlanda virino edziniĝas ŝi finas sian laboron, por ke ŝi tute dediĉu sin al sia hejmo. Se ŝi havas nenion por fari ŝi volonte sidas hejme antaŭ brile pura fenestro, rigardante en oblikvan speguleton kio okazas en la strato. Promenante en la urbo, precipe vendrede, oni rimarkas kiel la virinoj purigas fenestrojn kaj lavas trotuarojn, ĉar Nederlando estas konata pro sia pureco.

La nederlandanoj estas tre gastigemaj kaj oni povas viziti unu la alian sen esti invitata. Oni ne ricevas sep specojn da kukoj kiel en Svedujo, sed nur kafon kun unu kuko antaŭtagmeze kaj teon kun konfitaĵo posttagmeze.

Kiel gasto en nederlanda familio vi eble volas akompani ilin por fari aĉetojn. Sed ili ne eliras. Ĉio venas al



Haarlem: La Viandhalo.

SEF:s sällskapsresa till Haarlem

Till esperantovärldskongressen i Haarlem kommer SEF att anordna en sällskapsresa som startar fredagen den 30 juli från Malmö. Avresa på aftonen från Köpenhamn.

Kongressen äger rum lördagen den 31 juli—lördagen den 7 augusti 1954. Aterresan sker lördagen den 7 augusti med anslutningsmöjlighet till Stockholm via nattåg natten mellan söndagen och måndagen.

Sällskapsresan kommer att omfatta tåg 3 klass Malmö—Haarlem och åter, inkl. måltider under själva tågresorna, transporter av bagage stationen i Haarlem—inkvarteringen och omvänt, logi i hotell, pensioner eller privatrum i Haarlem inkl. frukost, alla dricks- pengar, skatter etc. inom ramen för programmet samt reseledare.

Trots de ytterst begränsade tillgångarna på hotellrum i Haarlem har SEF lyckats att, genom en från Sverige till ort och ställe utsänd representant, ordna ganska många sådana. Emellertid blir det de som anmäler sig först till resan som får hotellrum. När hotellrummen är slut måste inkvartering ske privat.

UEA har genom LKK underrättat alla kongressdeltagarna, att antalet bäddar i hotell och pensionat är begränsat. Vi ber därför alla resenärer att i största möjliga utsträckning beställa privatrum, vilka av LKK garanteras vara propra och rena.

Vi kommer att presentera flera olika priser på resan med inkvarteringar i hotell, privat etc.

Tack vare att vi haft egen representant där nere som diskuterat priser etc. kommer vi att kunna erbjuda bästa inkvarteringar till lägsta priser.

För att Ni redan nu skall kunna försäkra Er om en plats i kongressresan inbjuder vi redan nu till anmälan, som kan ske på särskild kupong i tidningen. Denna anmälan är ännu ej bindande, och så snart vi lyckats få fram alla priser kommer definitivt anmälningskupong att tillställas de som preliminärt anmält sig.

la pordo. Komencas matene per la laktoviro, "kiu biciklas sur sia paketbiciklo. Li sonorigas. Tiam oni ricevas la laktujojn aŭ lakton en granda kruĉo. Krom tio oni aĉetas buteron kaj ovojn de tiu viro. Poste venas la "panviro", la florvendisto, la legomvendisto k.t.p. Oni mangas legomojn ĉiutage.

La nederlandanoj estas individualistoj. Ĉefe la religio disigas la homojn. Ili havas kvar grandajn radioasociojn, protestantan, katolikan, neŭtralan kaj laboristan. Kiam oni legas la radioprogramojn en la esperantaj gazetoj, oni rimarkas tri mallongigojn por nederlandaj radioasocioj. La lernejoj, malsanulejoj kaj eĉ la sindikatoj estas dividataj en protestantaj, katolikaj kaj neŭtralaj.

Fine de la 17a jarcento ĉiuj eklezioj en Nederlando ricevis la samajn rajtojn. De tiu tempo la katolika eklezio konsiderinde kreskis kaj havas nun proksimume 3.700.000 anojn.

El la loĝantaro 38 % apartenas al la katolika eklezio, 31 % al la Reformita eklezio (Hervormde), 8 % al la denove reformita (Gereformeerde) eklezio. 17 % ne apartenas al iu ajn eklezio.

En Nederlando ne estas ŝtata eklezio. La Reformita eklezio povus esti nomata la popoleklezio, sed ĝi estas disigita de la ŝtato. Kiam infano estas naskiĝinta, oni ne registras tion en la preĝejo sed en la urba domo. Same je geedziĝo.

Tio ĉi estis kelkaj karakterizaĵoj pri Nederlando kaj la vivo tie, kion mi eksciis dum vizitoj kaj precipe dank' al mia Nederlanda edzino.

Arne Lundkvist

Vid anmälan indikera noga vilken form av inkvartering N i önskar.

Huvudledare: Jan Ströme, Malmö.

Preliminär anmälningsblankett för sällskapsresa till Haarlem. Undertecknad anmäler sig härmed till kongressresan till Haarlem i och för beivstande av esperantovärldskongressen 1954. Jag emotser närmare meddelanden.

Önskar inkvartering i:

- A) Hotell C) Privat
B) Pensionat D) Massförläggning

Insändes till:

Esperanta Turista Komisiono
Tegelbacken, Stockholm C

..... den

.....
namn (skriv tydligt)

.....
adress

(Kan insändas i avskrift. Behöver ej avskiljas.)

Koppla av efter kongressen i Haarlem och följ med på en härlig efterkongressresa utmed Rhendalen. Det blir en kombinerad båt- och busstur längs den mångbesungna flodens vackraste sträckor Bonn—Königs- winter—Koblenz—Bingen—Wiesbaden—Frankfurt.

Vi reser lördagen den 7 augusti från Haarlem och är hemma i Malmö söndagen den 15 augusti.

Fullständigt program presenteras i nästa nummer. Anmäl Eder redan nu på nedanstående blankett.

Preliminär anmälningsblankett för SEF:s efterkongressresa längs Rhen.

Undertecknad anmäler sig härmed till SEF:s efterkongressresa utmed Rhendalen 1954. Jag emotser närmare meddelanden.

Insändes till:

Esperanta Turista Komisiono
Tegelbacken, Stockholm C

..... den

.....
namn (skriv tydligt)

.....
adress

(Kan insändas i avskrift. Behöver ej avskiljas.)

KLUBBMEDLEMMAR!

När kursverksamheten nu börjar efter nyår, så gör slag i saken och anmäl Eder till en fortsättningskurs.

Att "gå i kurs" innebär ej blott att öka kunskaperna utan fastmer att **vidmakthålla intresset**. Ju fler man är, desto roligare blir det.

Alltså: Tag Er själv i kragen och gå med i en kurs, även om denna startat redan under höstterminen. Tala med kursledaren.

Bilda gärna en egen studiecirkel med sammanträden omväxlande i hemmen, om Ni är några stycken. Någon särskild ledare är ju ej alldeles nödvändig, om sådan ej finnes till hands.

Hjälp till att hålla god fart på kursverksamheten.

Infansonĝo

Olavo oscedis, premis sian ludilan urson al si kaj ekdormis...

Sed Luno eliras el sia blua domo. Li enrigardas al Olavo kaj diras: "Olavo, ĉu vi volus fari kun mi etan vojaĝon? Mi montros al vi ion tre interesan."

Olavo malfermas la okulojn. Ĉu vojaĝi? Tuj li estas preta. Kaj baldaŭ li sin trovas en stranga boato de molaj nuboj.

Klara, malvarma estas la vespero. Glaciaj floroj kreskas sur la vitroj. Blankaj brilas la tegmentoj. Sed Olavo ne sentas malvarmon, ĉar Luno volvas pecon de sia larĝa mantelo ĉirkaŭ lin.

La boato leviĝas. Olavo ĝojas, vidante, ke ĝi proksimiĝas al la preĝeja turo. Li ofte malsupre sur Tero kun admiro rigardis la orpluman kokon, fiere sidantan sur la turpinto. Lia koro ekbatas pro streĉo kaj atendo...

Sed ho, la koko aspektas laca, dormema kaj makula ĝia ora vesto.

La boato sin levas ĉiam pli supren. Tero malgrandiĝas, fariĝas nur eta punkto, malaperas. Olavo ĝuas pro la amuza vojaĝo. Etendiĝas ĉirkaŭ li fabela pejzaĝo: montoj, kampoj, maro, sed ĉio estas blua. Eklumiĝas kvazaŭ fajreroj, kiuj kreskas, ĉiam kreskas. Precipe unu tre plaĉas al Olavo pro ĝia mirinda ruĝa koloro. Sed la ruĝa lanterneto transformiĝas je okulo. Aperas besta kapo kun grandaj kornoj. Olavo por momento kaŝas sian vizaĝon sub la Lunan mantelon. — "Kia besto ĝi estas?" li flustras timigita. — "Bovo", respondas Luno trankvile! — "Bovo?" Olavo miras. Li iam vidis bovojn, kiuj sin paŝtis sur verda herbejo, sed ili ne aspektis tiamaniere kaj ne ŝprucis fajron el la okuloj.

Olavo vekigiĝas el sia pripensado. Ĉe la horizonto aperas impona giganto. — "La grandegulo kun sepmejlaĵ botoj", kredas Olavo. Sed Luno rakontas, ke estas ĉasisto. — "Kie estas la pafilo?" — La okuloj de Olavo ekzamenas. Jen, ĉe la zono de l'giganto pendas brila glavo. —

— "Rigardu, rigardu!" ekkrias Olavo entuziasme kaj fingre montras al la brileganta armilo. "Tian mi volus havi! Donu ĝin al mi!" — Sed Luno, opiniante, ke tiaj objektoj ne estas oportunaj ludiloj por infanoj, iom turnas la boaton...

— Senĉese sin prezentas al Olavo novaj mirindaĵoj. Virŝafo kun ora felo venas kure renkonte al li. Li etendas la manon por karesi ĝin, sed tiam la besto flankensaltas. Arĝentskvamaj fiŝoj ĉirkaŭnaĝas kaj el la bluaĵ ondoj sin levas timiga mara monstro, kiun Luno nomas "baleno".

Vere komika ŝajnas al Olavo stranga ĉevalo, kiu per grandaj flugiloj ŝvebas super lia kapo. Ekvidante ĝin li eligas ridon sonoranta kaj kunfrapas la manojn pro freneza ĝojo. Li volonte restus ĉiam en ĉi tiu regiono, kie troviĝas tiom da strangaĵoj, ke oni preskaŭ ne scias, kio estas la plej mirinda.

Sed subite li ekvidas ion, kio kaptas lian tutan atenton. Tutsupre en la bluaĵo trotas granda urso. Tamen ne tiu granda estas la plej alloga, sed malgranda, kiu ludas en ĝia proksimeco. — "Rigardu, rigardu!" ekkrias Olavo kaj senpacience ektiras la Lunan mantelon. — "Kia bela urso!" Donu ĝin al mi! Ĉar la mia perdis unu el siaj kruroj." — Sed Luno ne respondas. Li jam dormas, laca pro ĉiu nokta maldormado. Tiam Olavo surrampas la boatan randon por mem provi kapti la ĉarman besteton. Sed, ho ve, terura drako elŝovas sian kapon el malhela abismo. Malfermante la buŝegon, ĝi montras du vicojn da lancakraj dentoj. Olavo tiom ektimas, ke li perdas la ekvilibron, falas, falas...

Renkontiĝo

*Ĉe ombra flanko de la vivostrato,
Haltinte en la marŝo mi atentis,
Ĉu ia homo ĉirkaŭ mi ne sentis
La suferigan ungon de la fato...*

*Vi kuris do al mi, mizera frato,
Kaj antaŭ mia, via ĝem' silentis!
Per plendaj voĉoj kune ni lamentis
Pri nia sorto inda je kompato.*

*Nun sur la naŭza vivovoĵ' dolora
Naskiĝis vige tiu arda flamo
Nuranta sin el la pasi' fervora.*

*Nun por la larmoj trovas sin balzamo,
Ĉar sufokiĝas dum brakumo kora
La granda ĝemo en pli granda amo!*

Geraldo Mattos (Brazilo)

Hispana abstino

*Iam inter la hispanoj
sidis mi agrable
diskutante kun rondanoj
vinspecojn table.*

*Unu diris: "Se rilatas
vin kaj la abstinson,
kion vi prefere ŝatas
akvon aŭ la vinon?"*

*De alia tre medite
venis la respondo:
"Kiam akvo altkvalite
ŝprucas el la monto,*

*tre malvarma, tute pura
kaj kristale klara,
en kaskado senmezura
kiel Niagara;*

*kiam ŝaŭme ĝi torentas,
pikas la inklinon,
tiam — se soif' potencas —
mi elektas — vinon!"*

Poul Thorsen

Sed ŝajnas al li, kvazaŭ li falus sur liton de molaj nuboj. Lumradioj ludas ĉirkaŭ li kaj ĉe lia flanko kuŝas eta bela urso, sed nur kun tri kruroj.

Ella Nilsson

Recenzoj

Antologio de brazilaj rakontoj (33 rakontoj, 33 aŭtoroj kaj 33 tradukintoj. La novelojn elektis la Brazilia Belektristika Akademio. Antaŭparolo de s-ro Barbosa Lima Sobrinho, prez. de la Akademio. Eld. Brazilia Esperanto-Ligo 308 p. (Prezo: 12 kr.)

Tiu ĉi antologio estas unu el la plej gravaj faroj de nia traduk-literaturo. Kion ĝi signifas el kultura vidpunkto, tion simpla fakto dokumentas: en la libro estas prezentitaj 33 gravuloj de la brazila literaturo kaj ĉiuj tridektri verketoj reprezentas konindajn belajojn, sed — se vi rigardas la svedan literaturan enciklopedion ("Vem skrev vad?"), vi ne trovos eĉ unu nomon tie, same ne en la ĝeneralaj enciklopedioj svedaj; tiu fakto tute ne povas signifi, ke la brazila kulturo — pli ol kvarcentjara — ne estas inda por svedoj por ekkoni ĝin, sed ĝi signifas tute simple nescion malutilan, kiun la unuan fojon povas forigi la kompetentaj, brazilaj esperantistoj mem. Por svedoj tiu ĉi antologio malfermas ĝis nun malhelan horizonton kaj ekvivigas kulturvalorojn, pri kiuj ili apenaŭ havis konjektojn kaj supozeble tiu ĉi lando ne estas la sola, kie la antologio de la bravaj brazilanoj havas precize la saman signifon.

La enkonduko de la prezidanto de la Brazilia Belektristika Akademio ne nur donas klaran bildon pri la evoluo de la tiea literaturo, sed ĝi donas ankaŭ rekonon al nia lingvo kaj al ĝia kulturpera rolo. Tia rekono ja ne povis veni de pli kompetanta aŭtoritato ol de la akademia ĉefo de la ĉefa kultura organizo de la progresema sud-amerika lando.

Tridektri unuarangaj aŭtoroj prezentas siajn verkojn en la libro, tridektri spiritaj eminentuloj, kiuj vivas en la atmosfero de la mondliteraturo kaj reprezentas diversajn tendencojn literaturajn. Estas do malfacile trovi ion tute karakterizan nur pri brazilaj verkistoj, aŭ pli ĝuste ion, kio povus karakterizi kaj diferencigi tiun ĉi antologion de aliaj rakontaroj. Kompreneble oni povas menciigi ekzotikajojn, la specialajn mediojn de la brazila tero kun siaj plantoj, arbaroj, floroj, bestoj, birdoj kaj indianoj, kiuj entute certigas plezuron al ambaŭ partoj de la legantaro; al tiu kiu serĉas la eksteran interesecon kaj al la alia, kiu serĉas la kernon de la verkoj. Repensante pri la multkolora rakontaro, kiun oni ĵus ĝuis, oni tamen frapiĝas pri la konkreteco de tiu ĉi literaturo, la — en Eŭropo tiel ofte prezentita — lirika novelo nur escepte trovas reprezentanton en la volumo. Se la gazeto havus lokon, oni devus paroli pri la unuopaj verkistoj, sed tio — bedaŭrinde — ne estas ebla.

La tridektri tradukintoj ĝenerale faris tre bonan laboron, kelkaj eĉ elstaran. La spirito de tiu ĉi antologio estas vaste demokrata: oni tute allasis la taskon de la traduko al la unuopuloj, kio en kelkaj okazoj rezultis etajn diskuteblojn. Por menciigi nur unu tian, en la bela novelo "Aventuroj de bukedo da floroj dum revolucia tago" oni rimarkas la jenan dialogon:

- Mi deziras paroli al la ĝeneraloj.
- Ili ricevas neniun, akra voĉe respondis la oficiro.

La vorto "ricevi" (= akcepti) estas tipa nacia idiotismo kaj kvankam ne temas pri gravaĵo aŭ gravaĵoj, oni dezirus, ke en ĉiu okazo estu iu "inspektanto" super la — eĉ plej brava — kolektiva laboro.

La verko estas tre grava kaj tre rekomendinda.

F. Szilágyi

MUZIKA KAJ MONDLINGVA KONKURSO "ARIEL"

* Omaĝo al la urugvaja klasikulo J. E. Rodó kaj lia — en Esp. trad. — ĉefverko "Ariel".

Kun penso pri la aktualiganta decido pri la mondlingvo, s-ro Gino Catarzi (Verona) kun la helpo de la Esperanto Grupo de Verona iniciatis kaj asignis sume 50.000 it. lirojn por la jenaj belartaj konkursbranĉoj kaj por la sub punkto 5. prezentita **PREMIO JOSÉ ENRIQUE RODO**.

1. **Laŭro Kolomano Kalocsay**. Premio 10.000 it. liroj por la plej bona originala komponaĵo muzika, kantebla, ĝis nun ne publikigita, kies baza teksto estas literaturvalora originala poeziaĵo en Esperanto (aperinta post la komenco de 1930). Unu persono rajtas konkursi per maks. tri komponaĵoj. La teksto estu prezentita sub la muziknotoj.
2. **Laŭro Esperanto 1954**. Premio 10.000 it. liroj, por originala, ĝis nun nepublikigita poemo en la mondlingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun suma amplekso de 108 versoj.
3. **Laŭro Urugvajo**. Premio 10.000 it. liroj por hispanlingva, ĝis nun ne publikigita traduko de literaturvalora(j) originala(j) poemo(j) aperintaj post la komenco de 1930 en la lingvo Esperanto. Oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun suma amplekso de 108 versoj.
4. **Laŭro Verona**. Premio 10.000 it. liroj a) por versa traduko, esperantlingva de la t.n. "balkona sceno" el **Romeo and Juliet** de Shakespeare de la vortoj: "Can I go forward when my heart is here" (II-a akto 1-a sceno) ĝis la fino de la 2-a sceno — kaj parton de la lasta sceno de la tragedio, t.e. tiun parton de la 3-a sceno el la V-a akto, kiu komenciĝas per la vortoj: "Enter Montague and other"; — b) aŭ por tradukita, eventuale originala poeziaĵo en Esperanto, kies temo aŭ medio kaj etoso estas ligita al Verona. En la subbranĉo b) oni rajtas konkursi per 1—3 poemoj kun sume 108 versoj. La du subbranĉoj estos kune juĝataj por la laŭro.
5. **Premio José Enrique Rodó**. 10.000 it. liroj, aljuĝota al la plej altvalora kaj arte plej elstara konkursaĵo el la kvar branĉoj, pli supre menciitaj.

ĜENERALAJ INFORMOJ:

Ĉiu poeto kaj komponisto de la tuta mondo rajtas partopreni la konkurson.

Sendu ĉiun konkursaĵon en ses ekzempleroj al la konkursa sekretario d-ro F. Szilágyi, 3-dje Villag. 26, Borás, (Svedlando). En la branĉoj 3 kaj 4/b aldonu la saman nombron de la (event.) originalaĵoj. Skribu vian pseŭdonimon sur la konkursaĵojn kaj ankaŭ sur apartan paperon kaj metu tiun lastan — se la enlandaj reguloj permesas — en fermotan koverton kune kun via nomo kaj adreso. Pri la konservo de la anonimeco de la konkursantoj en ĉiuj okazoj respondecas la sekretario de la konkurso. Oni rajtas konkursi eĉ sub "verkista" nomo.

Aldonu tri maldekstre stampitajn internaciajn respondkuponojn. Se enlanda regulo ne permesas la elsendon de tiom da kuponoj, sendu laŭ la validaj reguloj malpli. El tiuj landoj, kiuj tute ne permesas la elsendon de kuponoj oni rajtas sendi konkursaĵojn sen aldono de ia kotizo.

LIMTEMPO POR LA RICEVO DE LA KONKURSAĴOJ el eŭropaj landoj la 15-a de marto, por landoj ekster Eŭropo la 10-a de aprilo, 1954.

Pri la kunmeto de la diversnacia komisiono kaj pri la publikigo de la rezultoj en Montevideo dum la aŭtuno 1954, detalaj informoj sekvos poste.

Borás, en oktobro, 1953.

D-ro F. Szilágyi

Tra la gazetaro

La Studento, Oktobro 1953

ISEU, kies 2a internacia konferenco okazis en Ljubljana Aŭgusto 1953, akceptis inviton de la Dana Studenta Esperanto-Asocio al konferenco en Danlando 1954.

La oficiala instruado de esperanto en la universitato de München kaj en la Teknika Alternejo en sama urbo ĉesis. Dum 13 studsezonoj d-ro S. Fiegler honorofice instruadis aŭ prelegis.

En la universitato de Little Rock profesoro G. Iggers instruas esperanton en klaso kun 15 lernantoj. Por la unua fojo oni instruas blankulajn kaj negrajn studentojn kune.

Laŭdaj recenzoj de Stellan Engholm pri "La Normandaj Rakontoj" kaj "Poemoj de Omar Kajam", la lasta tradukita de G. Waringhien.

La Juna Vivo, Oktobro 1953.

Interesa raporto pri esperantista junularo en Ĉeĥoslovakio: Spite al multaj malhelpoj en la nuna respubliko sufiĉe granda nombro de esperantistaj junuloj laboras sen centra organizo. Rondetoj kaj grupoj kreas regionojn, kie kunlaboradon gvidas regionaj delegitoj. Regionaj ciklostilitaj gazetoj estas gravaj helipoj. En la sistemo de kunlaborado partoprenas 25—35 grupoj kun pli ol 600 membroj. Krome ekzistas grupoj nekunlaborantaj pro diversaj kaŭzoj, timemuloj forlasintaj la movadon, kaj individuaj izoluloj, kiujn oni ne enalkulas. Oni akcentas servemon al la nacio kaj ŝtato, ĉar tio garantias almenaŭ toleradon de esperanto. Post la nunjara konferenco en Hardec u Opavy okazis terdaro kun celo perfektigi en esperanto kaj eduki grupgvidantojn. Por ke ili povu labori por esperanto en la lando ili lernis defendi esperanton el vidpunkto de marks-leninismo, kaj lingvoscienco de Stalin. Ili lernis pri historio kaj literaturo de esperanto kaj pri la nuna tutmonda stato de la movado.

La Juna Vivo, Novembro 1953

La somera internacia junularkunveno okazos en Nederlando, verŝajne en Hilversum, unu semajnon antaŭ la UEA-kongreso.

Internacia kulturpolitika renkontiĝo okazos inter Kristnasko kaj Novjaro en la Kulturcentro de Francaj Esperantistoj, kastelo Grésillon. Aranganto estas Germana Esperanto-Junularo en kunlaboro kun francaj junaj geamikoj. Gravan financan subtenon GEJ ricevis de la ministerio por Internaj Aferoj en Bonn kaj de la Franca Altkomisariejo por Germanujo.

Pesperanto, no. 4—5 1963 (Italia)

(La gazeto estas grandparte itallingva.)

La landan kongreson en Como somere 1953 vizitis 415 gesamideanoj inter kiuj 52 eksterlandanoj el 13 aliaj landoj. La raportinto interalie donas jenan rimarkon: "Dum niaj kongresoj, oni notas konstantan plibonigon de la vizaĝoj kaj de la vestoj de la kongresanoj. Ĉiam pli kaj pli da junaj vizaĝoj, ĉiam pli kaj pli da gajaj fraŭloj kaj belaj fraŭlinetoj. Kaj malaperadas la senzorgaj aspektoj: la jakoj havas ĉiujn butonojn, la poŝoj ne estas malkudritaj, la virinaj tualetoj estas ĉiam pli koketaj: se tio, kiel evidentas, ne dependas de riĉiĝo de le esperantistoj (alie malaperus ankaŭ la budĝetaj pro-

blemoj!), tio estas ŝuldata: unue, al envicigo de novaj junaj fortoj; due, al envicigo de normalaj personoj, por kiuj Esperanto estas io serioza, io digneca, kiuj montras tion per sia sinteno kaj per sia ekstera aspekto; trie, al malapero de fanatikuloj, kiuj disigas de ni ĉar nia movado elstaras kiel serioza, fortika, praktika, realisma anaro, kaj ne kiel palsonga sekto de iluziuloj. Kaj en tiu ĉi fakto estos la sekreto de niaj bonaj sukcesoj."

The British Esperantist, Nov.—Dec. 1953

Laŭda recenzo de Mason Stuttard pri "La Normandaj Rakontoj".

La 38a Brita Kongreso de Esperanto 1954 okazos en Manchester dum Pentekosto.

Dia Regno, Nov.—Dec. 1953

La Evangelio per Esperanto, elsendoj de stacio Hilversum, ondolongo 402 m, nun okazas lunde anstataŭ vendrede. La horo restas 23.15—23.30 MET. 18.1.1954 S-ro D. de Boer, Hago: Por ke ili estu unu. Muzika kontribuo de Jelly Koopmans-Schotanus, kantado, kaj Meindert Bockel, orgeno.

S-ino Anna Alamo-Sandgren dum la aŭtuno vizitis krom diversajn liberekleziajn rondojn plurajn teologiajn seminariojn kaj misiistajn edukejojn. La rektoro de baptista seminario en Stockholm jam tuj instigis al kreo de Esperanta kurso.

La kristana gazetaro volonte presigas novaĵojn el Verdlando. Pluraj longaj artikoloj pri la UK en Zagreb kaj KELI-konferenco en Rüdlingen aperis.

A. Ahlren

ESPERANTO EN LA SVEDA GAZETARO

Laŭ informo de nia korespondanto, s-o Allan Kramer, GÖTEBORGS-TIDNINGEN, grava ĉiutaga gazeto en Gotenburgo, jam de unu jaro regule publikigas esperantlingvan kolonon en ĉiu dimanĉa numero, sub lerta redaktado de s-o Schuldenfrei.

De temp' al tempo ni ricevas la ĉiutagajn gazetojn: NYA LIDKÖPINGS TIDNING kaj SKARA TIDNING — SKARABORGS LÄNS TIDNING kun esperanta kolono redaktita de nia energia samideano, Åke Blomberg, delegito de UEA en Lidköping.

Estus interese por ni ekscii ĉu ankaŭ aliloke en Svedlando aperas "esperantlingvaj kolonoj"?

Ĉi loke ni volas menciigi monatan gazeton svedan "FREDEN" (LA PACO) kiu regule enhavas "esperantan angulon" redaktitan en sveda lingvo. Samloke ni rimarkis gazetkurson pri esperanto sub la redakto de s-o Bengt Joelsson.

Cetere la sveda gazetaro ofte aperigas notojn pri esperanto. Espereble ni povos prezenti al nia legantaro statistikon pri aperintaj gazetnotoj (koncerne esperanton) en iu el la plej proksimaj n-oj. Poste ni klopodos ĉiun kvaronjaron doni tian statistikon dank' al sistema laborado de niaj energiaj kunlaborantoj en Skanio.

Ne forgesu sendi almenaŭ po 1 ekz., tuj post la apero, el ĉiu sveda gazeto, enhavanta noton pri la esp. movado (prefere la tutan paĝon kun indiko de gazeta nomo kaj aperdato kaj ruĝkrajona substreko) al la

Sekretariejo de Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C.

(Ĉu via loka gazetservo funkcias regule?)

Nia lingvo

Pri sufikso "-end"

Per lastatempa decido de nia Akademio, la sufikso -enda estas nun oficiala. Per tiu decido la Akademio de Esperanto montras obeon al la principo formulita de ĝia iama prezidanto, profesoro Théophile Cart: "La Akademio povas akcepti nur tion, kion la vivo, la praktiko montris akceptinda, bona, vivkapabla."

En tiu ĉi kazo, do, estas sankciita sufikso, kiu ne ricevis iom grandan disvastigon ĝis proksimume 1920. La difino de ĝia senco tekstas ĉie proksimume same: "kiu devas esti -ata, kiun oni devas -i". Ĉar, laŭ mia supozo, tiu ĉi sufikso neniam estis vaste uzata de la plejparto de la svedaj esperantistoj, mi pensis ĝin inda je speciala atento en nia revuo.

Ni traduku sveden: "farenda betyder, som skall, måste göras". Do, "la libro estas legenda" signifas "boken måste (bör) läsas" (fakte, pro legend', ankaŭ "det är en legend[arisk] bok").

La skribenda letero okupis la tutan tempon miajn pensojn = Det brev jag måste skriva upptog hela tiden mina tankar. — Kaj nun ni donu tre densan ekzemplon: Nu, kompreneble tiu romano estas leginda, sed por ĉiu studento pri mia fako estas studenda tiu ĉi dika libro; do, ĝi estas la sola libro legota de mi dum la nuna monato = Jo, nog är den där romanen läsvärd, men den här tjocka boken måste läsas in av alla studenter i mitt ämne, så det är den enda bok jag kommer att läsa den här månaden. — Vi vidas do

(a) ke -enda ne estas egala al -inda nek al -ota.

(b) ke ĝi estas pli mallonga kaj pli oportuna ol perfrazo por diri la saman aferon.

Eble, tamen, la supraj ekzemploj ne montris tute klare punkton (b), ĉar inter "la afero estas farenda" kaj "la afero devas esti farata" la diferenco ne estas vere grandega. Sed en alia kazo la ŝparo estas okulfrapa: konsideru la du esprimojn "afero farenda" kaj "afero kiu devas esti farata". Estas vere, ke la sveda posedas principe nur la duan eblon, sed en tiu lingvo la pasivo estas multe pli mallonga, dank' al la -s: göras = esti farata. Konsideru jenan tragedion:

La dentisto eltiris sanan denton anstataŭ la forigendan = Tandläkaren drog ut en frisk tand i stället för den som skulle ha tagits bort.

(Jes, samideano, post anstataŭ supre vi estus ankaŭ povinta uzi la nominativon; tio estas iom demando pri persona gusto.)

Finfine ni prenu alian ekzemplon, kiun povus uzi oratoro jurista esperantisto:

La viron nun punotan certe neniu el ni opinias puninda; sed, bedaŭrinde, laŭ niaj leĝoj li estas punenda = Den man, vars straff nu skall utmätas, anses förvisso inte av någon av oss vara förtjänt av straff; men tyvärr måste han efter våra lagar straffas.

Pensu speciale pri la unua frazoparto; mi evitis en la difino la vorton **skall**, pro tio ke **skola**, **skall** signifas krom **lernejo**, **skolo**, **bojo** ankaŭ **devi**, **esti -onta (-os)**, **voli** kaj **tiel plu**.

Nu, resume montras do:

-ota: klare sencon de estonteco (som skall = kommer att -as)

-inda: opinion, juĝon (-värd, som förtjänar att -as) kaj

-enda: devon (som skall = måste, bör -as)

Fermont

Lingva Konkurso

Nia konkurso vekis neatenditan intereson kaj ni ricevis multajn esprimojn de ŝato. Volonte ni plenumos la deziron redakti ĝin en esperanto. Entute 27 personoj sendis tradukproponojn, unu eĉ el Danujo. Tradukoj kun gramatikaj eraroj kompreneble ne povas esti konsiderataj. Bedaŭrinde la disponebla tekstospaco ne permesas detalan diskutadon pri senditaj tradukoj. Sufiĉu kelkaj komentoj. La ĉefa malfacilaĵo ja estis la vortoj mäsarmarknad. Foiro estas ĝenerale uzata kun la senco mäsas sed signifas ankaŭ ordinaran marknad. Meso havas nur la eklezian sencon de mäsas. Ĉi tie tamen ekspozicio ŝajnas la plej taŭga vorto. Por marknad tre konvenas ĉi tie bazaro (Vidu difinojn en UV de Fundamento kaj en la vortaroj de Wüster kaj de Nylén). La vorto merkato signifas neniam placon aŭ ejon sed vendosferon, kampon por komerca agado, proksimume = avsättningsområde el. -möjligheter. Kaj jen la traduko, kiun ni trovis la plej adekvata inter la senditaj proponoj:

La regulojn oni starigis por eviti ke la foiro ekhavu la karakteron de bazaro.

La anonima (kial?) aŭtoro bonvolu sciigi nomon kaj adreson kaj la uzitan pseŭdonimon kaj li ricevos etan libropremion.

Jen la nova problemo, pri kiu sendu solvojn al red. antaŭ la fino de februaro.

På morgonen skulle vi ha fortsatt vandringen, men vattnet hade stigit så mycket i floden och i alla andra mindre floder och åar, som vi skulle korsa, att vi måste stanna i lägret över dagen i förhoppning att vattnet skulle sjunka.

Rogo

Prenumeration å UTLÄNDSKA ESPERANTO-TIDNINGAR 1954

Namn	Helår
Amerika Esperantisto	8:—
Boletin (Spanien)	4: 50
Brazila Esperantisto	4:—
British Esperantist	4: 50
Dansk Esperanto-Blad	4:—
El popola Ĉinio	4: 50
Franca Esperantisto	4: 50
HEROLDO (jan.—juni 9: 50) (juli—dec. 8:—)	16:—
Juna vivo	4: 50
La praktiko	10:—
Norvega Esperantisto	4: 50
Oomoto	6: 50
Revuo ESPERANTO (UEA)	11:—
Scienca Revuo	7: 25
Sennaciulo (SAT)	8:—
Suda Stelo (Jugoslavien)	5: 50
Svenska Esp.-Tidningen (till utl.)	7:—
Svisa Espero	7: 25

Likvid insändes till postgiro 578

Förlagsföreningen ESPERANTO
Stockholm 19

EXAMEN

Underrätta Edra medlemmar (främst i kurserna) att examensdagen på våren blir redan den **28 februari 1954**. Examensskrivningarna kommer betydligt tidigare nu för att betygen skall kunna färdigställas till kursavslutningarna. Detta innebär samtidigt, att deltagare i nybörjarkurs som regel ej ha möjlighet avlägga lägre examen första året. En nybörjare bör gå även ett halvår i fortsättningskursen, så blir kunskaperna och säkerheten betydligt större (och betygen bättre!).

Sveda Somera Semajno

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO invitas al nova prelegsemajno en 1954. Ĝi okazos **8—15 aŭg. 1954** en **Frostavallen, Höör, Svedujo**, sekve tuj post la **Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem**. Frostavallen situas en suda parto de Svedujo kaj oni povas atingi la lokon post la fino de la kongreso en Nederlando.

La nombro de la partoprenantoj estas limigita (nur 80 personoj). Sekve oni tuj devas anonci sin. Petu informojn pri la restadprezoj kaj aliaj detaloj ĉe **S-ro Jan Ströme, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo**.

Prelegos: Prof. Ivo Lapenna, Jugoslavio. Docento Sigismundo Pragano, Nederlando. D-ro F. Szilágyi, Svedujo.

La plej aktualaj temoj estos pri **UNESKO** kaj la **Eŭropa Konsilantaro**.

Bonvenon al Frostavallen!



Universala Ligo

Ĉiam daŭre laboras por la federaciigo de la mondo. La strebado en tiu ĉi direkto pli kaj pli akiras terenon de la ĝenerala publiko. Inter la esperantistoj ĝi jam estas tiel disvastigita, ke la plej multaj el la samideanoj plimalpli tendencas al tiu direkto.

La organo de la ligo, La Praktiko, estas unu el la plej bonaj kaj sekve plej ŝatataj esperantogazetoj en la mondo. Ni ŝatus havi vian realigon kaj novaligon tiel frue kiel eble, por ke ne okazu prokrasto nenecesa en la liverado de la gazeto, kiu dum la lasta tempo aperis pli akurate ol pli frue. Malfrua aliĝo kaŭzas ankoraŭajn malfacilaĵojn. Tial bv tuj sendi vian kotizon al poŝtĝiro 741 75, Universala Ligo, Stockholm Sö. La minimuma kotizo estas 8,40 kronoj, sed svedoj kutime pagas 10 kr.

Nova speco de aktivaj membroj.

La decembra numero de La Praktiko informas, ke de nun oni povas esti aktiva membro de Universala Ligo, sen esti abonanto al La Praktiko. La kotizo por la nova speco de aktiva membro estas nur 1 kr. 40 oeroj. El tiu sumo UL sendas al la Mondmovado por Mondregistaro certan sumon. Ĉiu aktiva membro de UL estas samtempe persona membro de la Mondmovado. Tio estas grava por la esperantistoj. Ju pli da membroj ni havas en la Mondmovado, des pli oni atentos pri esperanto. Varbu membrojn kaj sendu kotizojn al Universala Ligo.

Dank'al vi la nova jaro estos prospera!

ENSPEZIGA KLUBFESTO



Por ricevi monon al sia studhejmo Klubo Esperantista de Malmö depost multaj jaroj aranĝas aŭkcion antaŭ kristnasko, prefere en la fino de novembro aŭ en la komenco de decembro. Malavaraj klubanoj donacas ĉion, memfaritajn brodaĵojn, pupojn, lampojn, pomojn, jes ĉion, kaj same malavaraj ĉeestantoj en la ĉiam plena salono interbatalas por altigi la prezojn sub gvido de la ege lerta Helge André.

La klubo tiamaniere enkasigas nete 700—800 kr. en unu sola vespero, kaj tio kompreneble estas ege bona helpo al la kaso.

Imitinda ekzemplo por aliaj kluboj.

Str.

SKANIA LOTERIO

Vid den 4 dec. 1953 företagen dragning utföll följande vinster:

Lott nr	Vinst nr	Lott nr	Vinst nr
54	7	1749	16
90	8	1776	11
99	15	2206	13
168	1	2212	10
243	4	2263	19
276	21	2333	17
763	9	2348	20
1103	14	2376	3
1202	2	2779	6
1329	5	2751	18
1730	12		

ESPERANTISTA FERIO EN LOFTHUS

11a—18a de aug. 1954

Venu pasigi vian ferion en belega regiono Hardanger en okcidenta Norvegujo! Intima amika kunestado kun gesamideanoj el multaj landoj.

Prelegoj, diskutoj, distraĵoj. Allogaj ekskursoj. Ĉiujn informojn donos

Okc. Distr. de N.E.L.
KRISTIAN SIVERTSEN,
BLEKENBERG 52,
BERGEN, NORVEGUJO.

Butler 70-jara

Montagu C. Butler en Londono atingas je 25-a de januaro nuna siajn 70 jarojn.

Butler estas tiu el niaj samideanoj, kiun mi plej admiras. Nun veterano de 1905, li vivis fidele Esperanton kiel patran lingvon kun siaj infanoj. Kiel praktika propagandisto li estas unika; kiom da paroladoj li faris al instruistoj kaj lernantaroj ĉie en la lando, li eble ne scias mem, sed mi dubas, ke lian nombron atingis iu ajn alia homo. Antaŭ kvin jaroj li skribis al mi: "Ankoraŭ mi faras po 150 prelegoj ĉiujare, sed, ho ve! de la komenco de la milito mi ne havas aŭton. Kaj tio tre malfaciligas la laboron." Li ankaŭ skribis: "Kelkfoje mi sentas min 100-jara, alifoje kun koro ankoraŭ tre juna" Butler havas diversajn kordojn sur sia liro. Mi nur parolu pri unu speciala. Konstante laborema por Esperanto kaj la movado, inter aliaj grandfaroj li kreis kaj modele ordigis la bibliotekon de la Londona klubo, kiu enhavas post tri jardekoj da senĉesa agado 50.000 erojn. Kaj antaŭ du-tri jaroj aperis ties scienca katalogo, sub la titolo; Klasifiko de Esperantistaj Temoj, verkita de M. C. Butler." — verko kiu kreskis sub liaj lertaj zorgoj pri tiu valorega kolektaĵo, unika post ĉiuj militaj detruoj aliloke.

Nian grandmeritan ĉefpropagandiston mi kaj certe kun mi la tuta esperantistaro kore, varme, sincere gratulas je lia 70-jartago, dezirante al li ankoraŭ longan, sanan vivon.

Paul Nylén

INFANDESEGNOJ

Laŭ la modelo de Gvatemala ni organizos komence de septembro 1954 tutmondan ekspozicion de kolorigitaj infandeseĝnoj sub titolo

"Nia lando kaj popolo."

Ni petas ĉiujn geinstruistojn, ke ili kunhelpu, instigante la infanojn fari sian plej bonan kaj al ni sendi la desegnojn. La ekspozicio okazos en la "Arta Halo de Karlskoga", kaj la plej bona de ĉiu jarklaso ricevos valoran premion. Krome la kvar sekvantaj ricevos specialan premion. (Entute 40 premioj.)

Kondiĉoj:

Aĝo de 7 ĝis 14 jaroj.

Ĉiuj desegnoj pri temo "Nia lando kaj popolo".

Ni petas la instruistojn elekti la plej bonajn desegnojn el sia klaso kaj sendi ilin.

Sur la antaŭan flankon skribu la nomon, aĝon, titolon de la desegno, ankaŭ la landon, sur la dorsan flankon preslitere la nomon, adreson, landon.

La desegnoj devas esti en Karlskoga antaŭ la fino de junio 1954. La adreso de la sendaĵoj:

Karlskoga Esperanto-Societo "La Aglo" c/o Tistad, Hotellgatan 5, Karlskoga, SVEDLANDO.

KOREKTO

La normanda rakonto: Kristnaska Noktomango, kiu aperis en la decembra numero estis kripligata ĉe la kompostado.

Dekstre kaj supre de la pli granda bildo, paĝon 110 oni legu:

Ni nun estis altbligontaj antaŭ la granda fajro de la alta kameno, en kiu rostigis lepora dorsaĵo inter du perdrikoj, kiuj bonodoris.

Mia kuzo levis la kapon: "Ne estos varme, kiam ni enlitigos", li diris.

Indiferenta mi respondis: "Ne, sed morgaŭ matene ni kaptos anasojn ĉe la laĝetoj."

La servistino, kiu metis nian mangilaron al unu ekstremo de la tablo kaj tiun de la servistoj al la alia, demandis: "Ĉu vi scias, sinjoroj, ke ni havas hodiaŭ la kristnaskan noktomangon?"

Evidente...

HAMBURGO JUBILEOS

Hamburga Esperanto-Societo festos la 1-am de Majo 1954 la 50-an datrevenon de sia fondiĝo. Tiucele ni aranĝos grandan feston dum du tagoj kaj ni invitas elkore gastojn el ĉiuj landoj. Jam nun anoncis sin gastoj el Danujo, Nederlando kaj Svedujo.

Provizora programo:

La 1-an de Majo 54:

10,00 h.—12,00 h. NOGELO-kunsido (Nordgermana Ligo).

14,00 h.—16,00 h. Komuna tagmango.

16,30 h.—18,30 h. Solena festo; 1) Kantado de ĥoro kaj kantistino; 2) Festparolado de la prezidanto kaj salutparoladoj de la gastoj (perantoj); 3) Kantado de kantisto.

mallonga paŭzo

Komenco de la serena parto de la festo per la teatraĵo: "Sinjoro Herkules" (aŭ alia).

Dimanĉe, la 2-an de Majo 54:

11,00 h. ekvojaĝo per la ŝipo ek de Landungsbrücken al Blankeneese kaj tie komuna tagmango.

La dimanĉvespero restos je la libervola dispo de la gastoj, por interkonatiĝi kun la urbo kaj la amuzkvartalo de la urbo "St.-Pauli".

La tranoktado estas ebla por kelkaj de niaj gastoj ĉe privatuloj kaj por aliaj en pensionoj kaj hoteloj. Ni aranĝos kiel eble la tranoktadon en la plej malmultekostaj hoteloj.

H. WIELGUS

HAMBURG-WILHELMSBURG

Georg-Wilhelm-Str. 38

HELSINGØR.

En la internacia altlernejo okazos internaciaj feriaj esperantokursoj 17—24 julio. Senpagan prospekton ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

REMINGTON portable
med esperanto-tecken



Reseskrivmaskin modell Junior Riter.

Förmånliga betalningsvillkor.

Kontantpriser:

Mindre modellen kr. 449:—

Större „ kr. 500:—



Förlagsföreningen

ESPERANTO

Postgiro 578

Box 19071. Stockholm 19

Ytterligare användning av akkusativändelsen -n

Måttuttryck. La domo estis sep metrojn alta, tri metrojn larĝa kaj ok metrojn longa = huset var sju meter högt, tre meter brett och åtta meter långt.

Tidsuttryck. En la pasinta jaro mi estis kvar monatojn en Londono = förra året var jag fyra månader i London. Ĉiun sabaton mi ludas tenison = varje lördag spelar jag tennis.

(Regel:

19. Mått- och tidsbestämningar, som utgör svar på frågorna: "hur stor?", "hur länge?" och "hur ofta?" får akkusativändelsen -n.)

Riktning: Morgaŭ mi veturos Parizon. Li iris en la domon. La kato saltis sur la tablon. I morgon skall jag resa till Paris. Han gick in i huset. Katten hoppade upp på bordet.

(Regel:

20. Målet för en rörelse kan uttryckas med ändelsen -n i stället för med preposition (al Parizo). Detta är regel, när riktning skall uttryckas efter en preposition, som annars anger befintlighet (t. ex. en, sur, sub, trans). Jämför betydelsen av följande satser: Li iris en la domo = han gick (omkring) i huset. La kato saltis sur la tablo = katten hoppade på bordet.)

Pronomen

Personliga	Possessiva
mi jag	mia min
vi du, ni	via din, er
li han	lia hans
ŝi hon	ŝia hennes
ĝi det	ĝia dess
ni vi	nia vår
ili de	ilia deras
si sig	sia sin

Vi lär oss ESPERANTO

Lektion 6



"Ne, persone mi neniel kontraŭas ke ni konsentus prunti al vi cent mil kronojn, sed mi petas vin telefoni denove post du horoj por ricevi definitivon konfirmon"

persono personligen, neniel på intet sätt, kontraŭi vara emot, konsenti samtycka, prunti låna, ricevi få, konfirmo bekräftelse, peti be. denove på nytt.

Räkneord

1 unu	11 dek unu	21 dudek
2 du	12 dek du	unu
3 tri	13 dek tri	22 dudek
4 kvar	14 dek kvar	du
5 kvin	15 dek kvin	o. s. v.
6 ses	16 dek ses	30 tridek
7 sep	17 dek sep	40 kvar-
8 ok	18 dek ok	dek
9 naŭ	19 dek naŭ	o. s. v.
10 dek	20 dudek	100 cent
		1000 mil
		1 000 000
		miliono

1967 = mil naŭcent sesdek sep, unua första, dua andra, tria tredje o. s. v.



Unu tagon, kiam mia bopatrino, mia edzino kaj mi iris por fiŝkapti, hazarde mi kaj mia edzino rapide ricevis multajn fiŝojn kvankam mia bopatrino ricevis nenium. Fine ŝi kolerigis, donis al mi la hokon kaj diris: "Surmetu alian vermon". — "Sed vi ja jam havas unu", mi protestis. — "Jes, jes", ŝi diris senpacience, "sed tiu ja ne faras sian plejbonon."

En dag, när min svärmor, min hustru och jag hade gått för att fiska, fick händelsevis jag och min fru snabbt många fiskar fast min svärmor ingen fick. Till slut blev hon förargad, gav mig kroken och sade: "Sätt på en annan mask." — "Men du har ju redan en", protesterade jag. — "Ja, ja", sade hon otåligt, "men den gör ju inte sitt bästa."

Tio estis la lasta leciono de tiu ĉi kurso. Vi ja ankoraŭ ne estas lerta esperantisto, ĉar mankas al vi multaj vortoj kaj multa ekzerco. Tamen vi jam per helpo de vortaro povas kompreni la plej multajn tekstojn.

Studu plu! Sveda Esperanto-Federacio volonte donos al vi konsilojn por plujaj studoj.

Detta var sista lektionen i denna kurs. Ni är ju ännu inte en skicklig esperantist, eftersom det fattas Er många ord och mycken övning. Emellertid kan Ni redan med hjälp av ordbok förstå de flesta texter.

Studera vidare! Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, ger Er gärna råd för vidare studier.



Stipendium

för deltagande i esperantovärldskongressen i Haarlem.

Tack vare en gåva från Sällskapet Humanitet är Svenska Esperantoförbundet i tillfälle utdela

2 st. stipendier å vardera 250 kr.

för deltagande i 1954 års esperantovärldskongress.

Sökande skall icke vara över 18 år.

Ansökan ställs till Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, och insändes senast den 30 mars 1954. Ansökningsblankett kan rekvideras från SEF. Meddelande om vem som erhållit stipendierna utsändes från Stockholm den 1 juni 1954.

KOREKTO PRI GOTENBURGO

En nia decembra numero, leginte informon en sveda taga gazeto "Göteborgs Posten", ni iom frue sciigis pri "Esperantoplaco" en Gotenburgo. La propono nome devas esti aprobata ankaŭ de la Urba Direkcio. Esperebla niaj gotenburgaj amikoj baldaŭ informos nin pri la definitiva decido.

För Montevideo-bidrag tackar vi:

Jan Strönne, Malmö; Elin Zandrén, Valskog; Karl Hörnquist, Filipstad; Rune Lundgren, Uppsala; E. W. Anjou, Göteborg; Sofia Lindberg; Erik Krantz; V. Wahlberg, Stockholm; E. Nordgren, Östersund; Walter Göranson, Trollhättan; Valdemar Linder, Stockholm; Sven Sune Lackland, Stockholm; Gust. Johansson, Falun; Edvin Medinius; Hugo Sköld, Gripenberg; Paul Nylén, Hudinge; Erik Ekström, Göteborg; Gustaf S. Andersson, Östersund; Carl Wahlbäck, Norrköping; Bror Lindström, Vattholma; C. O. Östling, Trelleborg; F. Szilágyi, Borås; John Stenström, Jönköping; Mia Aspenström, Borlänge; Karl Zloda, Stockholm; Karl Olin, Eslöv; Albert Svensson, Göteborg; Lennart Persson, Häradsbygden; R. Ahnefelt, Västerås; V. Tegel, Oleby; Rudolf Sjögren, Strängnäs; Gunnar Karlsson, Vetlanda; E. Håkansson, Uppsala; Sten Persson, Gränumsby; Gurli Lundquist, Ystad; Magda Carlsson, Ängelsberg; Edv. Johansson, Box 602, Norberg; Arvid Johansson, Gisebo; Stig Asjö, Spånga; Axel Bomgren, Upplandsbodarne; Ida Lindqvist, Upplands Väsby; Ebba Persson, Hälsingborg; A. Abrahamsson, Borlänge; Oscar Juhlin, Hamburgsund; Georg Persson, Lövänger; Gust. H. Johans-

son, Mora; Sven Sundin, Växjö; Axel Ahlqvist, Skånes Värnsjö; Märta Jense, Jönköping; Sven Hallberg, Alingsås; Ester Thuvesen, Höganäs; Helmer Almén, Bromma; W. V. Ahlin, Brovallen; Anna-Lisa Liss; Elis Carlström, Deje; A. Jacobsson, Visby; Sture Olsson, Strömsnäsbruk; Gulli Olsson, Strömsnäsbruk; Adolf Vestman, Björna; A. Svedmark, Stockholm; Anna Carlsson, Sundsvall; G. Hedlund, Uppsala; Bror Ejve, Bromma; Mackenzié, Limhamn; Elis Andersson, Norrköping; K. G. Carlsson, Göteborg; Arvid Höglund, Vid-se; Wilh. Johansson, Malmö; Oskar Frode, Göteborg;

derberg, Uppsala; Gustav Jönsson, Hällefors; Frida Löfstedt, Hälsingborg; Johannes Jacobsson, Kilforsen; Erik Halvars, Linghed; Karl Karlsson, Nynäshamn; Arvid Holmström, Silverhöjden; Einar Terohinen, Risudden; Robert Lindberg, Norrköping; Ville Lidell, Uddevalla; Bror Linné, Höje; Allan Kramer, Göteborg; Erik Ransemar, Hässelby Sanatorium; A.-L. Hallgren, Stockholm; H. Henrikson, Malmö; Stockholms Esperantoförening; C. B. Nilsson, Göteborg; Hugo Håkansson, Traryd; Hj. Olsson, Trelleborg; R. Ahlqvist, Uppsala; Edith Näslund, Uppsala; Hans Petersson, Lund 8; Ossian Eriksson, Surte; Nils Gustafson, Hällabrottet; I. Selander, Stockholm; E. Svensson, Uppsala; O. M. Carlsson, Dångebo; Herbert Rosendahl, Varberg; R. Encoson, Stockholm; J. Hansson, Jönköping; Paul Elgander, Älgårås; Erik Lindberg, Borås; Kåge Janson, Storkholm; Arvid Thun, Dalstorp; Stefan Szejnman, Johanneshov; Bertil Åkerberg, Hägersten; Gösta Eskilsson, Sandbäck; A. Lundkvist, Älvsjö; Skara Esperantosektion; Greta Hammarstrand, Vimmerby; Selma Persson, Österkorsberga; Gustaf Svärd, Bergvik 2; Gulli Svensson, Malmö; Evert B. Jannerman, Solna; Ebba Lundblad, Enebyberg; Erik Lindh, Brovallen; Harald Fingalsson, Gisebo; Karl Kloo, Ulricehamn; Margareta Milde, Sundsvall; Hjlamar Kihlberg, Vingåker; Harald Furhoff, Vingåker; Tore Hallerström, Billsbro; G. Tengling, Halmstad; Alma Hedlund, Robertsfors; Hillevi Zackrisson, Linköping; Edvard Gustavsson, Åmål; E. Lind, Stockholm; Sv. Jönsson, Hohög; Hjalmar Olsson, Stockholm; J. V. Holm; E. Tibbling, Norrköping; Eric Lundh, Göteborg; Fritz Lindén, Töreboda; Elsie Olander, Göteborg; Joel Wallberg, Torsåker; Skellefteå Esperanto-Klubb; Lars Larsson, Nösund; Maria Carlsson, Nitta; Johanna Lindqvist, Vika; Ingrid Ottosson, Åkerberga; Hans G. Rühle, Marback/Neckar, Germanujo; N. Henning, Älvsjö; Gunhild Ranestål, Kiruna;

MONTEVIDEO-

insamlingen får ej glömmas bort

Sänd Eder gåva till postgirokonto **14 74 29**
(Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

Vi behöver mera.

Vi väntar på Ert bidrag.

Ida Sterner, Grönahög; Albin Viklander, Sundsvall; H. Edvall, Alfta; Arvid Karlson, Göteborg; Signe Silver, Malmberget; G. Winnerhall, Stockholm; Sven Jansson, Häradsbygden; K. E. Karlsson, Göteborg; Sven Edenby, Strömsbruk; V. Svärd, Eskilstuna; E. K. Aspenström, Falun; Birger Gerdman; Jenny Kjellgren, Murjek; Anna Ekbohm, Boden 8; K. Malmkvist, Visby; Lennart Andersson, Stockholm; Hj. Carlsson, Göteborg; A. Skånander, Stockholm; Bengt Stenberg, Varberg; Börje Andersson, Skövde; Birgit Nordgren, Ljungbyhed; Holger Ohlsson, Mjölby; Erik Edholm, Alingsås; Paul Almén, Hällefors; C. Aldstren, Karlskrona; G. Anderson, Linköping; E. Rytenberg; Wera Sträter, Stockholm; Carl Stoltz, Hälsingborg; Carl H. Linder, Stockholm; Gösta Harling, Spångenäs; Ingvar Jonsson, Åseda; Karl Sö-

(Förteckningen fortsätter i nästa nummer. Om Ert namn är fel stavat beror det inte enbart på tryckfel-nisse, det är ibland omöjligt att genomskåda "hieroglyfernas" betydelse, och så noterar vi något som möjligen kan vara rätt. — Tänk vad en stämpel skulle betyda för Er som korresponderar med hela världen — och med oss!)

Har Din klubb ordnat BOKLOTTERI?

Många har redan utnyttjat denna möjlighet till extra inkomst vid Bokens Dag och julfesterna. Följ deras exempel och ordna ett lotteri nu på klubbens årsmöte.

Vi har färdiga vinstsatsar bestående av esperantoböcker för sammanlagt kr. 30:— uppdelat på 3 vinster till ca 15:—, 10:— och 5:— kr. värde.

2 satsar lotter för amerikanskt lotteri (numrade 1—99) samt anteckningslista (+ ett tröstpris) bifogas varje sats gratis. Fraktfri leverans.

Lottförsäljningen inbringar som bekant kr. 49:50 och Eder nettobehållning blir alltså kr. 19:50.

Och inte minst viktigt: Vinstsatsen behöver inte betalas förrän lotterna sålts!



Förlagsföreningen

ESPERANTO

Postgiro 578 Box 19071 Stockholm 19

STÄMPLAR och STÄMPELDYNOR

Fr. o. m. januari i år ta vi emot beställning på alla slags stämplor till konkurrenskraftiga priser

Prisexempel:

Vanlig skaffstämpel med namn och adress i storlek

*15 × 50 mm Kr. 8:50 20 × 50 mm Kr. 9:50

*15 × 60 mm Kr. 9:— 20 × 60 mm Kr. 10:—

* Lämplig för våra brevkort

Vi lämna gärna prisuppgift på alla andra storlekar och typer av stämplor

STÄMPELDYNA av ny konstruktion med GRÖN svampmassa i plastask. Storlek 95 × 55 mm. Kr. 2:25.

Beställningar mottagas även av våra bokombud



39-a Universala Kongreso de Esperanto

HAARLEM, 31.VII—7.VIII.1954

Adreso: POŬTFAKO 140, Haarlem, Nederlando
Banko: Rotterdamsche Bank, Haarlem
Banka poŝtĝirkonto: n-ro 8238

ANMÄLNINGAR

till kongresen verkställes av var och en särskilt. Ifyll och insänd anmälningsblankett och översänd kongressavgiften via affärsbank, som hjälper Er att ordna den detaljen. Kongressens bankförbindelse är: Rotterdamsche Bank, Haarlem.

KONGRESSAVGIFTER	Intill	31/3	30/6
Kongressmedlem	Guld.	22:—	25:—
	(sv. kr. c:a	30:—	35:—)
Make eller maka			
till d:o	Guld.	11:—	12:50
	(sv. kr. c:a	15:—	17:50)
Ungdomar			
högst 20 år	Guld.	7:50	8:50
	(sv. kr. c:a	10:—	12:—)

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estas en la presejo kaj atingos ĉiujn aliĝintojn en januaro. Kun ĝi estos la oficialaj Mendiloj por loĝejoj kaj ekskursoj. L.K.K. akceptos mendojn NUR per tiuj dokumentoj, kiuj formas parton de la arkiva sistemo. Sekve, ne mendu per letero aŭ poŝtkarto.

Fakaj asocioj: La L.K.K. disponigos senpage salonojn al "kunlaborantaj fakaj asocioj" (de U.E.A.). Aliaj asocioj devos pagi. Asocioj dezirantaj salonojn por fakaj kunsidoj kiel eble plej baldaŭ komunik tion al L.K.K. kun indiko pri la atendata nombro, kiu ĉeestos. La Oficiala Programo estas en preparo. Post aprobo de U.E.A. ŝanĝoj kaj aldonoj estos fareblaj nur post novaj konsultoj kun la Estraro.

Karavanaj aranĝoj: La L.K.K. avertas, ke ĝi neniel helpas al aŭ kunlaboras kun privataj aranĝantoj de karavanoj, kiuj memstare agas. Al tiaj aranĝantoj, kies agoj povas malutili al la organizado de la kongreso, la L.K.K. povas, laŭ la Kongresa Regularo, rifuzi aliĝon.

Sveda Esperanto-Federacio informis, ke ĝi rajtigis aranĝi karavanon al Haarlem: Ungdomens Resebyrå, Jungfrugatan 30, STOCKHOLM Ö, pere de S-ro K. E. Karlsson.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.
Adreso: Tegelbacken, Stockholm C.

Redaktoro: T. Morariu, Götaforsvägen 1, ENSKEDE.
Tel. 48 20 78.

Prezo de abono: por 1954 (12 n-roj) 6 sv. kr., duonjaro 3:50. Eksterlanda abono 7 sv. kr. aŭ 18 resp. kuponoj. Unuopa n-ro 75 öre.

Prezo de anoncoj: 1/1-paĝo 90:—, 1/2=50:—, 1/4=30:—, 1/8=15:50, 1/16=8:—, 25 öre por mm. Korespondaj anoncetoj: 25 vortoj=2:50, 50 vortoj=4:50.

Eldona Societo Esperanto s. p. r. (Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.)

Adreso: Box 19071, Stockholm 19. Ejo Sveavägen 98 VI, malf. 10h—15h. Tel. 31 65 01. Estro: Sune Ahlm, tel. hejma 50 88 05. Poŝtĝiro 578.

Universala Esperanto-Asocio

Peranto por Svedujo: Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C. Telefono: 20 00 43. Poŝtĝiro 20 12.

Kotizoj 1954: Membro kun jarlibro kr. 5:50, Membro-Abonanto kr. 14:50, Subtenanto 20 kr., Patrono 145 kr., Dumviva membro 290 kr.

Sveda Esperanto-Instituto. Yngve Nilson, Förvaltarvägen 20, Enskede. Tel. 94 19 59. Poŝtĝiro 515 11.



**PRENUMERATIONSavgiften för LA ESPERO
1954 INBETALAS TILL SEF, POSTGIRO 2012.**

Grava avizo por svedoj

La L.K.K. en Haarlem sciigas, ke pro nelojala agado de S-ro Anjou en Göteborg ĝi ne rajtigas lin esti peranto de la kongreso kaj ne agnoskas lian karavanon. Ĝi plue uzas la rajtigon de la Kongresa Regularo kaj ne akceptas lian aliĝon al la kongreso en Haarlem.

Komisiite de la L.K.K.
Mason Stuttard, K.K.S.

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet